FEDERACIO LANGVEDOKO-RUSILJONO
Prezidanto :
MAURIN Frédéric
20, rue de l' Aiguillerie
34000 MONTPELLIER
Tel : (67) 66 21 01

FEDERACIA KONGRESO
Okazinta en CARCASSONNE
La 19 kaj 20 de marto 1983-a.

# RAPORTO

Ĉi tie, nur aperos raporto de la ĝenerala asembleo, okazinta dimanĉe. La sabata kunveno estis nur prepara al la morgaŭaj debatoj.

Do, ĉiuj decidoj koncerne la ĉi jaran agadon de la la federacio aperas en tiu raporto.

## A- MODIFO DE STATUTOJ .

F. Maurin memorigas la diversajn aspektojn de tiu modifo. Ĝi precipe celas mallongigi la daŭron de la prezidanta kaj estrarana postenoj al maksimume du mandatoj. (T.e. dufoje tri jaroj)

Llech-Walter tute ne aprobas tiun proponon, ĉar laŭ lia opinio kaj sperto, ne estas sufiĉe da bonaj kaj kapablaj esperantistoj en nia regiono, kaj eĉ kelkaj agemuloj ne akceptos tian postenon. Argumente, li legas respondon nean de S-o Capus, el Montpellier, kiu antaŭ tri jaroj (1), rifuzis prezidantecon.

D-o Albault, el la Federacio Midi-Pyrénées, opinias ke tiu modifo estas teorie bona, sed praktike ĝi povas fariĝi ne sufiĉe fleksebla. Se ekzemple mankas kandidatoj al prezidanta aŭ estrarana posteno, ekestos krizo. Tamen li favoras tiun proponon, kaj proponas inskribigi ĝin en Kongresa Rezolucio.

Maurin timas ke rezolucio restu ne-aplikata.

Hénin kaj Amouroux opinias ke ni perdas tempon, parolante pri teoriaĵoj, kaj ke estos preferinde iri rapide al praktikaj aspektoj de la federacia vivo.

R. Triolle memorigas al ni, ke ŝi klopodis enkonduki samtipan modifon en la statutoj de U.F.E., tamen sensukcese. Laŭ ŝi, la mondo estas ĉiam evoluanta, kaj respondeculoj, eĉ se tute kapablaj iam, ne plu konstatas tiun evoluemon post longtempa respondeciĝo, kaj ili ne profitas ĝin.

Maurin aldonas ke jam sama modifo estis enkondukita en la statutoj de UEA kaj oni akordiĝas nun, ke ĝi fariĝis renovigilo de la agemuloj; Pluraj malkonsentas ĉar UEA disponas je plia homa forto ol simpla federacio.

Frus opinias ke ni ne devas tro teoriumi, kaj ke praktike tia modifo estas ne-realisma.

Hénin kaj Amouroux denove reliefigas la troan teoriecon de la propono, kaj invitas la ĉeestantaron al pli rapida debato, ĉar restas multaj praktikaj eroj por pridiskuti.

Maurin konsentas kun ili kaj proponas voĉdonon, surbaze de la propono mal longigi la prezidantan kaj estraranajn postenojn al du mandatoj maksimume.

Aprobas : 3 . Malaprobas : 6 . Sin Detenas : 0 . (2)

Ĉar korumon oni ne atingis, oni denove voĉdonas. Jen rezultoj :

Aprobas : 5 . Malaprobas : 12 . Sin detenas : 4 .

La propono estas do malaprobita. Maurin proponas al la voĉdonantoj krei internan regularon, kie troviĝos ne devigaj, sed aplikindaj decidoj : (3)

Aprobas : 16 . Malaprobas : 0 ; Sin detenas : 6 .

Lasta demando:" ĉu ni inskribigas en tiu interna regularo mallongigon de la postenoj ?"

Aprobas : 15 . Malaprobas : 0 . Sin detenas : 6 .

Akceptas redaktadon de tiu interna regularo juna samideanino el Nimes, Mireille VERNHET.

Post redaktado, la interna regularo estos proponita al federaciaj membroj, kaj voĉdonita, tutcerte perkoresponde.( se leĝe eblas)

ĉiujn ideojn oni bonvolu sendi al

F-ino Mireille VERNHET
14, rue B. Latzarus
30000 NIMES Tel : (66) 26 93 36

B- PRAKTIKAJ ASPEKTOJ .

a) Libro-Servo

Hénin klarigas por la ĉeestantoj la funkciadon de la libro-servo, pri kiu li respondecas : mendo de libroj, rabatsistemo, malfruiĝo por aliaj libro-servoj, precipe UFE-a. R. Triolle respondas ke la problemoj graviĝis de la malsaniĝo de S-o Rousseau, el Parizo. Sed, laû J. Hénin, tiuj malfruiĝoj ekzistas de pli longa tempo.

Li plendas ankaû pri la rabatoj, kiujn pli malpli bonvole UFE konsentas. R.Triolle respondas ke pri tio ne kulpas UFE, kiu ne povas konsenti pli interesan rabaton, ol tiun de la eldonisto.

Pri tiuj problemoj, ne venas aliaj pliaj informoj.

Hénin, poste, demandas ĉu ni devas fari profiton per/por la libro-servo. Pluraj eblecoj alvenas kaj ni voĉdonas :

Profito de 10% : 10 . Profito de 5% : 8 . Malpli ol 5% : 1 .

ĉar la rezulto ne estas vere decidiga, oni nun proponas nur enkasigon de la rabatoj konsentitaj .

Aprobas : 18 . Malaprobas : 2 . Sin detenas : 1 .

Enkasigo de la rabatoj profitos nun al la libro-servo de la Federacio.

Hénin, aliflanke, proponas eldonadon de libroj, fare la Federacion. Interalie "Les 1000 mots en Espéranto" por komencantoj, kaj ankaû por perfektiĝantoj. La propono estas unanime decidita, kaj la Federacio provos realigi tion ĉi jare. Hénin akceptas respondecon de tiu eldonado.

Aliaj proponoj venas pri eldonado.(regionaj verkistoj, poeziaĵoj, dulingvaj libretoj, prezento de Okcitana aû katalana lingvoj aû verkistoj...) La Federacio pristudos, espereble ĉi jare, ĉiujn kazojn .

b) Turismo

Nova turisma strukturo estas proponita de Hénin kaj Maurin, kies celo povos akordiĝi parte kun tiu de la turisma komisiono de UFE.(4) Praktike, ĝi konsistas en kolektado kaj kompilado de informoj pri la regiono, sed ne nur pri vidindaĵoj, sed ankaû pri loĝeblecoj (Hoteloj, tenduejoj,...), manĝebleco, kaj ĉiuj informoj aliaj (busreto, prisana informaro, asocioj...) Oni profite trafoliumos vojaĝlibrojn, interalie "le guide du routard" aû "le guide en jeans".La celo estas do doni al esperantistoj ilon efikan dum vojaĝo, sen ke ili necese kontaktu alian samideanon (t.e. ne devige).

Post la kolektado kaj kontrolo, ni povos mem eldoni turisman gvidlibron, aû partopreni komunan eldonon kun UFE.

La propono estas akceptita, kaj ricevas respondecon en

| | | |
|---|---|---|
| Béziers | S-ino Authier, F-ino Terral | |
| Carcassonne | S-o Borque | (5) |
| Espalion | S-o Rocher | |
| Nimes | S-o Frus kaj S-ino Soulier | |
| Perpignan | S-o Gérard | |
| Toulouse | S-o Oster | (5) |

...nin sin proponas kiel kunordiganto de via agado. ...

c) Semajnfino ĉe la maro.

Federacio Midi-Pyrénées kutimas pasi unu tagon ĉe la Mediteranea marbordo, ĝenerale dum junio. Estas proponita de la du federaciaj estraroj, okazigi komunan linyan semajnfinon, aŭ por varbi novajn esperantistojn, aŭ por perfektigi komencintojn. La propono estis teorie akceptita, sed ĉar mankis al ni tempo, oni ne povis debati pri la organizo, interalie : (6)

- Kie ? (Bèziers, Valras, Sète...)
- Kiacele ? ĉu por komencantoj, perfektiĝantoj, movadanoj...
- ĉu ni organizas ekzamenojn ?

d) UFE-staĝoj

Ofte homoj plendas ĉar staĝoj de UFE ĝenerale okazas en la Pariza sidejo. Tute logike venis la propono organizi staĝon en nia regiono, kune kun federacioj Midi-Pyrénées kaj Provenca. Kompreneble, la problemoj ne mankas, kaj R. Triolle, kvankam ŝi favoras, substrekas ke plimalfacilas venigi homojn ĝis la plej suda parto de la lando.

Neniu decido estis ebla, sed la komitato pristudos tian eblecon, kun la aliaj federacioj kaj UFE.

C- DEMANDOJ KAJ BONDEZIROJ AL UFE-KONGRESO

a) kotizsistemo

La demando venas parole de Maurin kaj skribe de D-ino Vierne, kiu ne ĉeestas la kongreson. ĝi baziĝas sur konstatoj :

+Unue, de 1977-78 ĝis 1980-81, la nombro de abonantoj konstante kreskis :

| | |
|---|---|
| 77/78 | 627 |
| 78/79 | 642 |
| 79/80 | 653 |
| 80/81 | 688 |

Modifo de la kotizsistemo estis decidita dum la 1981-a kongreso, kaj ĉi jare la Asocio perdas 29 abonantoj.

+ Due, de almenaŭ 5 jaroj, la nombro de simplaj membroj, kiuj ne rajtas voĉdoni, konstante kaj rapide malkreskis. Vidu jenon:

| | |
|---|---|
| 77/78 | 451 |
| 78/79 | 360 |
| 79/80 | 298 |
| 80/81 | 266 |
| 81/82 | 214 |

Ni konstatas ke dum 5 jaroj, ni perdis pli ol la duono de la simplaj membroj.

La nuntempa stato aperigas plurajn demandojn kaj konstatojn :

- ĉu la neatendita malkresko de la abonantoj ne rilatas kun la nova kotizsistemo, eĉ se kompreneble oni ne povas fari ekzaktan analizon nur post unu jaro da aplikado ?
- Aliparte, ĝi malfaciligas nian laboron, ĉar ni ne plu kontrolas niajn membrojn, al kiuj federacia strukturo povas aspekti nun senutila. Plie, la kotiza rebato ne estas tiel efika kiel antaŭe.

Pro tio, kaj ĉio antaŭa konsiderite, la Federacio Langvedoko Rusiljono akcetas atentigi UFE-estraron ke kelkaj grupoj rifuzas la nunan enkasigon de la kotizoj, ĉar ne konvena por ili, kaj ĝi rekomendas al ĉiuj kulturaj centroj elekti la plej trafan sistemon por si.

b) Voĉdona sistemo

D-ino Vierne kaj Maurin opinias ke la modifo en la voĉdona sistemo (ni nun voĉdonas rekte al UFE, dum antaŭe la voĉdono okazis dum la federaciaj kongresoj) malampleksigas la eblecojn pridiskuti la strategion de UFE-estraro. Efektive, la membroj nun voĉdonas nur konsiderante la moralan kaj financan raportojn de UFE. Sed, tiel, la membroj nur ricevas informojn de UFE-estraro mem, kiu informas pri sia propra agado. Estus preferinde ke aliaj organizoj, ekzemple la federacioj, informu la membrojn.

Aliparte, konstatendas ke la raportoj, unue nur klaras por spertuloj (precipe la financa), kaj due, entenas kelkfoje erarojn (En morala raporto, oni diras ke la nombro de abonantoj kreskis).

R.Triolle asertas ke nur temas pri modifo de proceduro, kaj ne de la sistemo kiu restas senŝanĝe. Ŝi klarigas al ni ke tiu modifo fariĝis deviga, ĉar la nombro de voĉdonantoj ĉiam restas malgranda. Maurin dubas pri la efiko de tiu modifo.(7)

Ĉiukaze, la kongreso rifuzas atentigi UFE-estraron pri tiu problemo.
( Aprobas : 1 . Malaprobas : 0 . Sin detenas : 18 )

d) <u>UFE-Kampanjoj</u>

Demando komuna de D-ino Vierne kaj Maurin pri la rezultoj, el/enspezoj, perspektivoj, rilate la kampanjon "Les dix rendez-vous avec la langue internationale". Ili rimarkigas ke estas eble senutile lanĉi novan kampanjon, t.e. SEL IN 84, antaŭ korekte analizi la rezultojn de la jam lanĉitaj kampanjon. Preciza raporto mankas, kaj financa bilanco ne aperas klare en la raporto.

Ni voĉdonas :
Aprobas : 11 . Malaprobas : 0 . Sin detenas : 3 .
Oficiala demando al UFE estos farita dum la nacia kongreso. (8)

e) <u>dumkongresa voĉdono. Oficialaj reprezentantoj</u>

Maurin demandas ĉu la reprezentantoj de la Federacio rajtos decidi pri ne planita kaj antaŭ anoncita propono fare la UFE-estraron.
La kongreso decidas ( Aprobas : 12 . Malaprobas aŭ sin detenas : 0) ke la reprezentantoj nur rajtas voĉdoni nome de la federacio nur pri la temoj, kiujn ni diskutis dum la Federacia kongreso.

Ni do atentigas UFE-estraron pri la neceso diskonigi sufiĉe frue la temojn diskutotajn dum la nacia kongreso. (9)

Aliparte, la Federacio estos oficiale reprezentata dum la Nacia Kongreso en Romans de Hénin kaj Maurin.
( Aprobas : 11 . Malaprobas : 0 . Sin detenas : 1 )

---

(1) Eble pli antaŭe.
(2) Ni estas proksimume 50; Rajtis voĉdoni 29.
(3) La propono venis de D-o Albault kaj de R.Triolle.
(4) Vidu "Franca Esperantisto", n° 339, paĝoj 112-3.
(5) Federacio Midi-Pyrénées akceptis kunlaboron pri tiu gvidlibro.
(6) En la momento de la redaktado, jam estis decidita ke ĝi okazos la 18 kaj 19-an de junio, tutcerte en Gruissan, por komencantoj kaj perfektiĝantoj. Ni okazigos ekzamenojn (1-a grado, 2-a grado, Atesto pri Kapableco) se eblas. Pliaj informoj venos en Aprilo.
(7) Li malpravas. La nombro de voĉdonantoj triobliĝis kaj atingis ĉi jare 510.
(8) Respondis J.L.Teixier, prezidanto de UFE.
Oni preparis 100.000 "unua rendevuo"-jn kaj inter mil kaj du mil aliajn rendevuojn. Ĝi kostis 10.000FF. Oni kalkulis ke vendo de 40.000 ekzempleroj ekvilibras la buĝeton, kaj UFE vendis 60.000. Do, la afero estas profitodona. Inter 200 kaj 500 unuaj rendevuoj revenis, kaj inter 10 kaj 30 dekaj rendevuoj. Inter 10 kaj 5 personoj aliĝis al perkoresponda kurso de UFE.
(9) Simbole, ni malakceptis sidiĝi ĉe la unua vico, por malebligi limigitan diskuton inter federaciestroj kaj estraro. Aliparte, la Federacio sin detenis dufoje ĉar la proponoj ne estis antaŭanoncitaj.